

Ni paroletu pri la historio de E-o

instruante la sufiksojn -uj-, -io-, -ano

Al la instruisto: laŭ la sperto, nefacilas instrui -uj-, -io-, -ano, pro la ŝajna malreguleco kiun Esperanto elmontras ĉi-rilate: oni samtempe renkontas Italujo kaj Italio, aŭ greko kaj greklandano. Pro tio, lernantoj kutimas konfuziĝi.

Necesas instrui tion en laŭorda kaj logika maniero, kiu samtempe estu interesa. La leciono sube provas fari tion, dum ĝi paroligas la lernantojn pri la historio de E-o.

UNUA PARTO

Instruisto: Ni parolu iomete pri la historio de E-o.

Kiu inventis (verkis, kreis) Esperanton?

Lernantoj:

Zamenhof inventis Esperanton.

Kiam, en kiu jaro, li inventis E-on?

Li inventis ĝin en 1887.

Fakte, Zamenhof pensis pri Esperanto jam kiel knabo 13-jaraĝa. Dum la jaroj li korektis la lingvon, kaj nur kiam li havis 26 jarojn, en 1887, li publikigis Esperanton.

Kia lingvo estas Esperanto?

Esperanto estas facila lingvo, bela lingvo... internacia, moderna, ĉarma, kultura, neŭtrala, paca lingvo.

Kie Zamenhof loĝis, kie li vivis?

Li vivis en Polujo.

Al kiu popolo Zamenhof apartenis?

Li apartenis al la juda popolo. Li estis judo.

Kiuj aliaj popoloj vivis en Polujo?

[samtempe kun la demando, la instruisto preparu malplenan tabelon sur la tabulo, kaj plenigu ĝin iom post iom, ne tuj komplete, sed laŭ la respondoj kiuj venadas de la lernantoj]:

Lando	Membro de la popolo	Kiu popolo? Kiu lingvo?
Pol <u>u</u> jo	polo	pola
German <u>u</u> jo	germano	germana
Litov <u>u</u> jo	litovo	litova
Rus <u>u</u> jo	ruso	rusa

La poloj, kompreneble.

Instruisto: Atentu: polo estas la homo, kiuj apartenas al la pola popolo. Kiuj aliaj?
Lernanto: Germanoj.Litovoj.Rusoj.
 Kiuj lingvoj estis tiam en Polujo?
 La pola lingvo estas la lingvo de la pola popolo, aŭ de la *poloj*.
 La germana lingvo estas la lingvo de la ...?
 De la germanoj.
 Kaj kiu estas la lingvo de la litovoj?
 La litova.
 Kaj la lingvo de la rusoj?
 La rusa.
 Kaj la lingvo de la judoj (en la tempo de Zamenhof)? Ĝia nomo devus esti 'la juda', sed fakte ĝia nomo ne estas 'la juda lingvo', sed 'la jida lingvo'.

Rimarko: Se la lernantoj demandas kial Esperanto ne estas reguleca ĉi-rilate, eblas respondi, ke temas pri la nomo de la lingvo, kaj samkiel nomoj de homoj ne havas regulecon, ankaŭ oni ne adentu regulecon de nomoj de lingvoj.

La lando de la poloj estas Polujo. Kiu estas la lando de la germanoj?
 Germanujo.
 Kaj kiu estas la lando de la litovoj?
 Litovujo.
 Kaj la lando de la rusoj?
 Rusujo.
 Do, gesinjoroj, kalkulu: kiom da lingvoj estis en 1887 en Polujo.
 Kvin lingvoj: La pola, la rusa, la germana, la litova kaj la jida.
 Ĉu estis harmonio inter la poloj, germanoj, rusoj, litovoj kaj judoj en Polujo?
 Ne, ne estis harmonio inter la popoloj.
 Kial ne?
 Ĉar la homoj en Polujo parolis kvin malsamajn lingvojn.
 Kial Zamenhof inventis Esperanton?
 Zamenhof inventis Esperanton, ĉar li volis, ke estu harmonio inter la popoloj.
 Kial vi lernis Esperanton?
 Eblaj respondoj:
 Mi lernis Esperanton, ĉar mi volis havi geamikojn el la tuta mondo.
 Mi lernis Esperanton, ĉar mi amas la ideon de Esperanto, harmonio inter la popoloj.
 Mi lernis ĝin, ĉar mi amas lingvojn

DUA PARTO

Instruisto: Gesinjoroj, antaŭe vi diris, [la instruisto indiku la tabelon sur la tabulo] ke Germanujo estas la lando de la germanoj, Polujo estas la lando de la poloj. Tiel ankaŭ Japanujo estas la lando de la....?

Lernantoj: Ĉinujo estas la lando de la...? Japanoj
 Francujo estas la lando de la...?. Ĉinoj
 kaj tial plu.... Francoj.

Sed, gesinjoroj, ĉu en la vera mondo vere estas tiel? En la vera mondo estas landoj kun *pluraj* popoloj. Pensu pri Belgujo, kiuj popoloj vivas tie?

La lernantoj povas respondi en la nacia lingvo: La flandroj kaj valonoj/la nederlandanoj kaj la francoj.

Do, ĉu ni rajtas diri “Belgujo”? Ne, ĉar tio signifus, ke la lando apartenus al la belga popolo, sed fakte ĝi apartenas al du popoloj. Tial ni diras ne “Belgujo”, sed Belgio. Same pri Hungarujo: Kiuj popoloj vivas en Hungarujo.

Hungaroj, slovakoj...

Tial estas pli bele diri ne Hungarujo (kiu signifus ke la lando apartenas nur al la hungaraj loĝantoj), sed Hungario.

Same pri Israelo: kiuj popoloj ĉefe vivas en Israelo?

Judoj kaj araboj.

Kaj en Usono?

Usono estas lando al kiu venis multegaj popoloj.

Kaj en Nederlando?

Nuntempe estas kelkaj popoloj en Nederlando, granda minoritato estas de Indonezio.

Kaj en Brazilo?

Portugaloj, indianoj (indiĝenoj), homoj el Afriko.

La lernantoj rajtas helpiĝi per la nacia lingvo por esprimi tio.

Kaj kiel ni nomu la homojn, kiuj vivas en tiuj landoj?
 En Rusujo vivas ruso. En Francio vivas... franco.
 Kaj en Brazilo....?
 Kaj en Israelo?
 Helplu min kompletigi la tabelon, mi petas.

LANDO	LOĜANTO
Rusujo	ruso
Francio	franco
Brazilo	brazilo (???)
Israelo	israelo (???)

Instruisto: Ĉu tio povas esti?

Lernanto:

Ne, estas problemo, ĉar la lando kaj la loĝanto ne povas esti la sama vorto.

KION FARI? Oni uzas –an-.

Rimarko: por ne instrui al la lernantoj tro multe en unu leciono, prefere instruu la sufikson –an- en la pasinta leciono tuj antaŭ tiu ĉi.

–an montras, ke mi estas membro. Se mi vivas en vilaĝo, mi estas vilaĝ-ano, se mi loĝas en Parizo, do kvazaŭ “membro de la komunumo de Parizo” mi estas pariz-ano. Se mi kredas je Kristo, mi estas Krsit-ano. Same se mi loĝas en Brazilo, mi estas kvazaŭ “membro de la (granda) komunumo de Brazilo”, do brazil-ano

LANDO	LOĜANTO
Rusujo	Ruso
Francio	Franco
Brazilo	brazilo brazil-ano
Israelo	israelo israel-ano
Peruo	peruo peru-ano
Usono	Usono uson-ano
Kanado	kanado kanad-ano

Do, resume:

1) se la nomo de la lando finiĝas per –ujo, tiam ĝia loĝanto finiĝas per –o. (anglujo/angl-o)

2) se la nomo de la lando *ne* finiĝas per –ujo, tiam la loĝanto finiĝas per –ano, kaj tio montras, ke li estas ‘membro’ de tiu lando. (Kanado/kanad-ano)

EPILOGO

Eblas aldoni en la nacia lingvo.

Fakte, gesinjoroj, Zamenhof, en la lastaj jaroj de sia vivo, preferis, ke oni ne diru “Germanujo”, sed li diris, ke estas pli bele diri: “Germanio”, ne Rusujo, sed Rusio, ne norvegujo, sed Norvegio. ktp, ĉar laŭ Zamenhof, la teritorio de la lando apartenas al *ĉiuj* popoloj, kiuj loĝas en ĝi.

En Germanio vivas Germani-anoj, en Norvegio vivas norvegi-anoj, kaj en Rusio vivas Rusianoj, ks.

Tio estis parto de privata filozofio de Zamenhof, kiu nomiĝis “Homaranismo”.

Homo -> hom-aro -> homar-ano -> homaran-ismo

Zamenhof sentis sin membro de la tuta homaro.

Kion vi pensas, gesinjoroj, ĉu tiu ĉi ideo, ke la teritorio de lando apartenas al ĉiuj popoloj kiuj vivas en ĝi, estas bela ideo?

Laŭ la konsisto de la klaso, povas kreiĝi eta diskuto, eble en la nacia lingvo.